# Zamenhof-festo
# 14 decembro 2024

La 14-an de decembro 2024 tri klubanoj de Brno (Milan Kolka, Miroslav Malovec, Marek Pavlovský) partoprenis Zamehof-feston en Pola Instituto en Vieno. Unue ni renkontiĝis (dudeko da personoj) ĉe la monumento de Zamenhof en Karlsplatz, poste ni trairis la urbon ĝis la Esperanto-muzeo, de tiu la perpendikla strato kondukis nin al la Pola Instituto, kie okazis la aranĝo. Kelkaj homoj ĉeestis virtuale sur granda ekrano.

La estro de Esperantomuzeo Bernard Tuider prezentis la muzeon kaj precipe programon de ciferecigado de dokumentoj. Franz-Josepf Geidel donis konsilojn, kiel akiri kaj teni novulojn. Videofilmeto de Mirka Tomečková prezentis la venontan kongres-urbon Brno.

El prelego de F.-J. Geidel: Instruado de Esperanto, varbado de interesuloj, tenado de la lernantoj.
Lasu la fajreron disvastiĝi ekde la unua momento!, Ne donu vian retpoŝtadreson al la novouloj. Obeu bazan merkatikon, Lernado, Instrui signifas laboron, Agu individue, tajloritaj lerneroj, Niveloj kaj stiloj, multflanka lernado, Simple diru ĝin, Faru novaĵojn.

Sekvis malgranda bufedo, dum kiu ni povis babili.


De la Pola Instituto ni iris al la Kristnaskaj merkatoj, kie estis tro multe da homoj, tial ni prefere aĉetis punĉon (Kolka kaj Malovec) kaj rapidis al metroo kaj buso al Brno.















1.,Am Gestade


POLNISCHES INSTITUT


POLNISCHES
INSTITUT
WIEN











Diĝitaj dokumentoj
de la Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj
Historio, havaĵoj kaj celoj de la Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj
POLNISCHES
INSTITUT
WIEN


Franz-Joseph Geidel
iama estrarano de AEF
Esperantisto ekde 2005
Esperanto-instruisto ekde 2014


SUB LA PREĜEJO DE ST. JAKUB ESTAS LA
GRANDA EN EŬROPO.




TUŜITA NATURO KAJ
NNOMBRAJ MIRINDAJ ĈIRKAŬVIDOJ